

Михаил Лермонтов,  
Der Tod des Dichters  
*tradukita de Friedrich von Bodenstedt*

...

Михаил Лермонтов,  
La morto de la poeto  
*tradukita de Konstantin Gusev*

...

Der Dichter wollte seine Ehre rächen,  
 Die er durch giftiges Wort verletzt geglaubt,  
 Da traf ihn selbst das Blei, sein Herz zu brechen,  
 Zu beugen sein gewaltig Haupt. . .  
 . . . Und Manche jetzt frohlocken, daß er fiel,  
 Und rühmen gar den Mörder, der sein Ziel  
 So gut getroffen, und im kalten Muthe,  
 Fest, ohne Zittern, that den Mörderschuß,  
 Der unser Land geröthet, mit dem Blute  
 Des liederreichen Genius. . .  
 . . . Ein Abenteurer kam er aus der Ferne,  
 Er nahm kein Herz mit sich, ließ keins zurück —  
 Rang sucht' er bei uns, Titel, Ordenssterne,  
 Denn unverständlich war ihm andres Glück,  
 Er fand was er gesucht in unsrer Mitte,  
 Er fand bei uns ein zweites Vaterland —  
 Sein Dank war: daß er sonst auf jedem Schritte  
 Was ihm beegnete, verächtlich fand.  
 Fremd blieb er unsrer Sprache, unsrer Sitte,  
 Das Volk war ihm ein Gegenstand des Hohnes,  
 Er suchte keine Gunst als die des Thrones...

Pereis li, poet' de justo,  
 Murdita per la kalumni',  
 Kun peza plumbo en la brusto  
 Kaj venĝavido mortis li! ...  
 Ne povis la animo luma  
 Subiĝi al la malhonor',  
 Li sola kontraŭ fals' monduma  
 Ribelis ... Kaj li estas for!  
 Murdita! ... Do por kio ploroj,  
 De l' povraj laŭdoj tarda ĥor'  
 Kaj sinpravigoj de l' sinjoroj?  
 Pro fato li jam estas for!  
 Kaj ĉu ne vi kolere pelis  
 La noblan kanton de liber',  
 Elblovi incendion celis  
 El la ĵaluzo — nur fajrer' ?  
 Do ĝoju ... Mutas bardo nia,  
 La bonon rompis la malbon'.  
 Ne lumas plu la stel' genia,  
 Forvelkis la solena kron'.  
 Murdinto lia senkompata  
 Ekpremis feron de la ĉan',  
 La koro vanta batis glate,  
 Neniom tremis tiu man'.  
 Kaj ĉu ne miro, ĉu ne strango?  
 Pelata per la sort' migrant',  
 Nomadis li en nia land'  
 En serĉo de feliĉ' kaj rango,  
 Ofende mokis pli kaj pli  
 De nia tero lingvon, moron  
 Kaj malestimis nian gloron,  
 Ne sciis en la sanga horo,  
 Sur kion levis sian manon li! ...  
 En tombo kuŝas jam la bardo,  
 Samkiel tiu, kiun li kun ardo  
 Prikantis sorĉe en la versroman' —  
 Kantisto de bonkoro kaj bonfarto  
 Murdita per la senkompata man'.  
 Por kio de la pac' kaj simpla vilaĝloka  
 Enpaŝis mise li al la mondom' sufoka  
 Por la sincera sent' kaj liberema saĝ' ?  
 Por kio premis li la malamikaĵn manojn,  
 En la envia rond' serĉante la kompanojn,  
 Li, kompreninta homojn de l' junaĝ' ? ...  
 Anstataŭ simpla kron' al li surmetis ili  
 La kronon dornan, nur kun laŭro por ornam' —  
 Ĝi devas kvazaŭ ĉiam brili,  
 Sed kaŝe piki, piki jam;  
 Venenis liajn lastajn horojn frido,  
 Malica flustro mokis lin, kaj jen  
 Li mortis kun la vana venĝavido,  
 Kun kaŝa disreviĝo kaj ĉagren'.  
 La kantoj de mirinda brilo  
 Ne sonas jam sub la ĉiel',  
 Malhelas lia mortazilo

*Traduko de la Rusa poeto "Смерть поэта" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de FRIEDRICH VON BODENSTEDT (\*1819 – †1892).*

*Arg-951-1918 (2013-12-15 20:30:08)*

*Traduko de la Rusa poeto "Смерть поэта" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).*

*Arg-951-1917 (2013-12-15 10:56:39)*

*Tiu ĉi poem-esperangigo troviĝas en la retejo [http://donh.best.uw.edu/Esperanto/Literaturo/Poezio/morto\\_poetou.html](http://donh.best.uw.edu/Esperanto/Literaturo/Poezio/morto_poetou.html).*